# N I A V O Ĉ O

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **NOVEMBRO 2008**


**ZAMENHOFA BANKEDO EN MADRIDO**

**13-an de decembro (sabato) je la 14,00h, en Restoracio "Candilejas Sur", c/Candilejas 32 (Vallecas), Prezo 28-30 eŭroj.**

La organizanto, Pedro Hernández, informas:

Kiel en la pasintaj jaroj, mi organizos la Zamenhofan tagon en la sama restoracio de Valeko (Vallecas) "Candilejas Sur", c/Candilejas 32, la 13-an de decembro (sabato). Mi ankoraŭ ne havas la menuon, sed mi supozas ke ĝi kostos pli malpli 28-30 eurojn. Krome, oni povos ĝui ankaŭ la faman prelegon pri García Lorca de Miguel Fernández kaj havi la tradician libroservon, kvankam mi ankoraŭ devas interkonsenti pri la loko, kiel eble plej proksime de la restoracio.

Do, MI PETAS: informu min, se vi intencas veni, ĉu sola aŭ akompanata, kaj ĉu vi estas vegetarano aŭ ne, por ke mi povu fari provizoran liston, kiel eble plej frue. Provizore mi mendis lokon por 40 homoj (pasintjare ni estis 35, se mi bone memoras), sed mi ne povos garantii pli da lokoj tuj antaŭ la koncerna tago.

**Kontakto: Pedro Hernández 912234853 kaj 622126416** esperantio@ono.com

**ESPERANTO EN HISPANIO**

**13ª Andaluza Kongreso de Esperanto**

La venontan 7an / 9an de novembro okazos en Kordovo la 13-a Andaluza Kongreso de Esperanto. La sidejo de la Kongreso estos la Junulara Gastejo de Kordovo, komforta gastejo kie oni disponos pri salono dum tiuj tagoj por paroli, amikumi, diskuti kaj ridi en esperanto. Por faciligi la aferon pri la restado kaj la manĝado al ĉiuj gepartoprenantoj oni ricevis oferton de la Junulara Gastejo pere de kiu oni povos matenmanĝi, vespermanĝi kaj dormi de la vendredo ĝis la dimanĉo kontraŭ 52 eŭroj entute.

Pri la programo, kvankam ankoraŭ tiu afero ne estas tute fermita, okazos prelegoj, inter ili tiu de Rikardo Felipe Albert Reyna pri lingvo kaj literaturo en Andaluso; de Pedro Hernández Ubeda pri esperantistaj denaskuloj kaj esperanto-familioj kaj de José María Rodríguez pri la teorio de la ludoj aplikita al la lingvoj. Interesiĝantoj sin turnu al la retadreso: esperanto14@ono.com *(Informo de José Mª Rodríguez).*

**Artikolo pri Esperanto en malaga ĵurnalo**

Angel ArquIllos informis ke en la papera kaj reta eldonoj de Diario Sur, de Málaga, la 15an Oktobro aperis longa artikolo favora al Esperanto, informante interalie pri la kurso okazanta en la Lernejo por Plenkreskuloj Al-Andalus, citante ankaŭ la adreson de Malaga E-Asocio: http://www.diariosur.es/20081015/malaga/idioma-universal-gratis-20081015.html

**ESPERANTA MONDO**

Nia kara liceano Augusto Casquero, kiu denove estas en Chinio, partoprenis en la 7a Esperanto-kongreso de Kantono kaj de la provinco Guangdong. La evento okazis en la urbo Kantono. Augusto inaŭguris bazan kurson de Esperanto ĉe la altlernejo de porprofesiaj studoj en la ĉina urbo Foshan. Aliĝis al la kurso 60 gelernantoj kun granda entuziasmo. Li ankaŭ okupiĝas pri kurso de la hispana lingvo en la altlernejo. Helpas lin Peng Jin, mem esperantisto kaj direktoro de la altlernejo, kaj Liu Weizhuang, ĝenerala sekretario de la Esperanto-Asocio de Kantono. Augusto sukcesis komunikigi siajn lernantojn kun alilandaj esperantistoj per videokonferenco. Libera Folio raportis pri la evento: http://www.liberafolio.org/2008/chinainstruado

**PARTOPRENO DE ESPERANTO EN GRAVA EKONOMIA ARANĜO**

Inter la 10a kaj 13a Septembro okazis en pola banurbo Krynica la 18a Ekonomia Forumo. Ĉi-jare ĝin jam 3an fojon ĉeestis ankaŭ esperantistoj – nome reprezentitaj far Eŭropa Esperanto-Unio, kiu dum la aranĝo elpaŝis kun propra podia diskuto kaj prizorgis informstandon pri Esperanto kun tutaranĝa deĵorado.
Legu pli en Eŭropa Bulteno: www.europo.eu/bulteno/1_EB-74-2008.pdf

**SOLENA FESTO EN UNESKO HONORE AL ZAMENHOF**

Iniciate de la pola delegitaro ĉe Unesko, subtenata de la litova delegitaro, kaj en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, la 15-an de decembro 2008 okazos en la sidejo de Unesko en Parizo solenaĵo por celebri la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

Pedro Hernández anoncis ke la nova horaro de HEF-Oficejo (Rodríguez San Pedro, 13, Madrido) estas:- De lundo ĝis vendredo: matene de 10,00 ĝis 12,00 .
Sabate: de 11,00 ĝis 13,00 . Tel. 914468079 .

**OKAZIS EN MADRIDO**

Sabaton 4-an Oktobro sukcese okazis amika kunveno en Pub Finnegans, sub la gvido de Pedro Hernández. Lundon 6-an Oktobro okazis same sukcese la tradicia konversacia rondo en Rodríguez San Pedro 13, gvidita de Juan del Castillo. Dimanĉon 19 Oktobro okazis ekskurso al Canencia, gvidita de Juan Trenado, kun dek partoprenantoj.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

- Babilrondo en Pub Finnegans, Plaza Salesas, 9, Madrid, 1an Novembro. Gvidas Pedro Hernández.
- Konversacia rondo ĉiulunde je 18.30 en HEF-Rodríguez San Pedro, 13. Lundon 3an Novembro, pri la temo “Japanio”.
- 15an Novembro tagmanĝo en restoracio “El Granero de Lavapiés”, Argumosa, 10 (Pedro Hernández)
- Dimanĉon 16-an de novembro. Matene. Partopreno en la fama "Romería de San Eugenio" Oni povas iri buse ekde Moncloa. Ni rendevuos en la Placo de El Pardo. Ebleco de senpaga manĝado. (Lupe Sanz)

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid